



№ 112, majo 2020
ELDONO DE RUSIA ESPERANTISTA UNIO (REU)



Karaj geamikoj!

Majo de 2020 markas la grandan jubileon – 75-jariĝo de malvenko de nazia Germanio sub batoj de la kontraŭhitlera koalicio. Ni memoras, kiom grandan prezon devis pagi por tio ĉiuj popoloj, kaj la plej grandan oferon faris la popoloj de Sovetunio. Tial la Tago de la Venko, kiu finis la plej teruran danĝeron por la homaro, estas por ni tiom grava. La ofero de la popoloj por la Venko ne devas esti forgesita! Ni gratulas vin ĉiujn pri tiu grava datreveno!

Al la dato ni dediĉas la plenan grandan kajeron de nia kultura suplemento al “Ponto” – “Cerbe kaj kore”, kie vi trovos poemojn, verkitajn dum kaj pri la 2-a mondmilito, kiuj rakontas kaj pri ĝiaj teruraĵoj kaj pri neceso konservi la pacon. Krome, ĝi enhavas grandan esploron pri tiuj esperantistoj, kiuj mem partoprenis la militon kaj kontribuis la Venkon. Komprenoble, temas nur pri tiuj, pri kiuj eblis trovi informojn, la laboro devas daŭri plu, por ke neniu el la veteranoj-samideanoj estu preterlasita.

La venko super naziismo devus ŝanĝi la tuthomaran mondkoncepton, kaj la homoj ne plu devus militi. Por tio la venkinta alianco kreis specialan novan internacian organizon de Unuiĝintaj Nacioj, kiu celis trovi pacajn vojojn por solvi la internaciajn konfliktojn. Proksimiĝas ankaŭ 75-jariĝo de tiu organizo, kiu, bedaŭrinde, ne sukcesis plene efektiviĝi sian destinton, sed sen kiu, verŝajne, la postmilita mondo estus pli malpacema, ol ĝi reale estis. Esperantistoj ĉiam strebis kunlabori kun UN, Universala Esperanto-Asocio estas en konsultaj rilatoj kun ĝi, kaj, kvankam UN ĝis nun ne akceptis Esperanton, kiel sian laborlingvon, ni ja estas konvinkitaj, ke tia akcepto povus fari efikecon de tiu organizo – same, kiel de kiu ajn organizo internacia. Kaj ni dediĉu niajn penojn al tio, ke tio iam efektiviĝu! Ni prepariĝu al la datreveno de UN (24.10.2020), kaj faru ĉion, por ke tiu grava rezulto de la granda Venko ne fiasku.

Bedaŭrinde, ne nur militoj minacas al la vivo de la homoj. Ekzistas minacoj naturaj, kaj kun unu el tiuj defioj ni nun kunpuŝiĝis. La kronviroza pandemio perturbis la vivon de la plej granda parto de la homaro, kaj ankaŭ de nia relative malgranda komunumo. Ne okazos UK, pluraj aliaj internaciaj aranĝoj. Ĉu okazos RET en Krasnojarsko, ni ankoraŭ ne povas diri – klaros nur fine de majo – sed povas esti, ke ankaŭ ne. Sed esperantistoj nepre solvos la problemojn – eĉ naciaj kongresoj povas okazi rete, kiel montris la ekzemplo de Irano, kaj ni faru ĉion eblan, por ke la pandemio ne havu negativajn postsekvojn, kaj ni ricevu plian puŝon por evoluo!



100-jariĝo de la morto de Hector Hodler: Revuo Esperanto libere elŝutebla



La 31-a de marto 2020 markas la 100-jariĝon de la morto de Hector Hodler. Tiu svisa esperantisto, kiu estis fondinto de UEA kaj motoro de la revuo *Esperanto*, sendube estas inter la plej gravaj laborintoj por nia afero. De la junulara agado ĝis bestoprotektado kaj la pacproblemo, de la nasko de pluraj iniciatoj ĝis la vasta kunordigo de la movado, sennombraj estis la kontribuoj de Hodler, kies vivo estis signifoplena por Esperanto. Omaĝe al li la aprila numero de la revuo estas libere elŝutebla ĉe uea.org/revuoj.

Filo de la svisa pentristo Ferdinand Hodler, Hector naskiĝis en Ĝenevo la 1-an de oktobro 1887, la jaron, kiam aperis la Unua Libro. En 1903, 16-jaraĝa, li lernis Esperanton kune kun sia samlernejo Edmond Privat, kun kiu li fondis lokan klubon kaj kreis la revuon *Juna Esperantisto*. Jam en tiu jaro la revuo ĝuis la aperigon de 6 numeroj kaj fariĝis internacia organo por ligi la junajn Esperanto-parolantojn de tiu frua periodo. Ĝi daŭris ĝis 1914.

En tiu periodo Hodler ankaŭ kontribuis al la plurtema revuo *Tra la mondo*, fama pro la kvalito de siaj ilustraĵoj kaj unika tiuaspekto en la frua epoko de Esperanto. En 1905 li aperigis sian tradukon de la klasika novelo *Paŭlo kaj Virginio*, majstroverko de Bernardin de Saint Pierre, kiu profunde kritikis la dividon de sociaj klasoj en la Francio de la 18-a jarcento.

En 1906 Hodler partoprenis la 2-an Universalan Kongreson, kiu okazis en lia naskiĝurbo, kaj estis aparte tuŝita de la ideoj pri la internacia organizado de la movado pere de Esperanto-konsuloj, laŭ propono de Théophile Rousseau kaj Alphonse Carles. Tiuj ideoj kongruis kun liaj deziroj organizi internacian reciprokan helpon inter homoj de bona volo kaj el tio ekestis la ĝermo de Universala Esperanto-Asocio.

En 1907 Hodler transprenis la redaktadon de la revuo *Esperanto*, fondita du jarojn antaŭe de la franca anarkiisto Paul Berthelot, kaj metis ĝin por plena utilo de la organizado de la movado, sed ankaŭ por diskuti la socian vivon kaj mondan situacion de tiu epoko. Li redaktis la revuon dum 13 jaroj, efektive ĝis sia morto, kun nur sesmonata paŭzo pro la Unua Mondmilito. Kiel konate, la revuo daŭras ĝis nun kiel oficiala organo de UEA kaj ĝia aprila numero de 2020 estis dediĉita al la memoro de Hector Hodler. Krom tio, en la 21-a jarcento la revuo *Esperanto* gajnis novan atingon pere de la reta revuo, alirebla senpage al ĉiuj esperantistoj per revuoesperanto.org.

Ĝis la 3-a UK en 1907, en Kembriĝo, pere de la revuo *Esperanto* kaj kunlabore kun Rousseau kaj Carles, Hodler evoluigis la ideojn pri Esperanto-konsuloj (delegitoj), kun granda subteno de la komunumo, kaj finfine en 1908 li fondis Universalan Esperanto-Asociacion kune kun Théophile Rousseau. Hodler fariĝis ĝia Ĝenerala Direktoro kaj Vicprezidanto. Per UEA li celis "krei fortikan ligilon de solidareco inter diverslingvanoj". Efektive dum la milita periodo li organizis la Dumilitan Helposervon de UEA, kune kun la tiam Sekretario Hans Jakob. La servo kaŭzis eksterordinaran bruon kaj ĝuis valoran agnoskon por la Asocio. Post la morto de Harold Bolingbroke Mudie, tiam Prezidanto de UEA en 1916, pro la Unua Mondmilito la prezidanta posteno restis vaka ĝis 1919, kiam Hodler estis elektita Prezidanto, la jaron antaŭ sia forpaso, la 31-an de marto 1920, en Leysin, Svislando. La forpaso okazis precize 28 tagojn antaŭ la 12-jariĝo de la Asocio, kiu en 2020 fariĝas 112-jara. Li tiam estis nur 32-jaraĝa.

Hodler heredigis al UEA la revuon *Esperanto* kaj sian Esperanto-bibliotekon, kiu nuntempe havas lian nomon. Li ankaŭ testamentis gravan parton de sia havaĵo al UEA, kun la celo certigi ĝian ekziston kaj pro tio estas konsiderata ankaŭ la unua protektanto de la Asocio.

En sia artikolo pri Hodler por la Enciklopedio de Esperanto de 1934, László Halka skribis: "Estas karakterize por lia nobla animo kaj humaneco, ke en Ĝenevo li aliĝis al la loka bestoprotekta societo kaj diris, ke li ŝatus fari el UEA asocion por protekti la homojn. Je la fino de sia vivo, dum la milito, kiam li jam estis ofte malsana, li turnis sin ĉefe al sciencaj problemoj". Halka ankaŭ diras: "Hodler estis idealisto, sed kun granda praktika sento. Li pensadis senĉese, kiel li povus fari Esperanton praktike uzebla, per tio preparante internacian tuthomaran popolon. Li opiniis, ke oni ne devas apartigi la mondlingvan movadon de la aliaj sociaj movadoj. Oni devas fari pere de internacia organizo amasmovadon esperantan, malgraŭ, ke li bone sciis, ke Esperanto progresas jam per si mem, eĉ sen iuj specialaj organizaĵoj".

Pro tiu grava okazo por nia movado, ni kuraĝigas al ĉiuj fariĝi kaj resti membro en UEA: uea.org/alighoj/alighilo. Ni ankaŭ invitas al pli profunda esploro pri la vivo kaj verko de Hodler. Apartaj rekomendoj estas: la libro *Utilita estas aliĝo*, de Ulrich Lins (katalogo.uea.org/katalogo.php?inf=8043), kies unua triono riĉe prezentas la historion de Hodler kaj UEA; *Novaj vojoj* (katalogo.uea.org/katalogo.php?inf=261), kiu kolektas la elstarajn artikolojn de Hodler pri la pacproblemo, aperintaj en la revuo *Esperanto* de 1915 ĝis 1917; kaj la originala romano *Hodler en Mostar*, de Spomenka Štimec (katalogo.uea.org/katalogo.php?inf=7664), kun historia fono ĉirkaŭ Ferdinand Hodler, la patro. Kiel eblas legi en la aprila numero de 2020 de la revuo *Esperanto*, ankoraŭ ĉi-jare aperos nova libro pri Hector Hodler kaj eblas trarigardi plurajn verkojn liajn ciferece en la retejoj de la Nacia Biblioteko de Aŭstrio.

Pri Hodler Privat skribis: "Al tio, kion iniciatis la genio de Zamenhof sur kampo lingva, li aldonis la necesan bazon sur la kampo socia".

Mesaĝo de UEA okaze de la Internacia tago de multflankismo, 24 aprilo 2020

[Mesaĝo sendota al UN. Kun afabla peto republikigi ĝin en viaj lokaj kaj landaj paperaj gazetoj kaj aperigi ĝin en viaj aliaj komunikiloj. Dankon!]

Ofte ni pensas pri Unuiĝintaj Nacioj kvazaŭ temas simple pri sendependa internacia organizo plene kapabla alfronti la problemojn de la mondo. Ĉirkaŭ Unuiĝintaj Nacioj, kvazaŭ sub ĝia tegmento, troviĝas aro da specialigitaj instancoj kiuj okupiĝas pri demandoj tiel diversaj kiel mastrumado de la monda ekonomio, fikso de internaciaj normoj por la monda ŝiparo, kontrolado de progreso en edukado, plibonigo de agrikulturaj produktado kaj distribuado, atento al la bonfarto de la infanoj de la mondo kaj konservo de la paco en maltrankvilaj mondaj regionoj.

Kaj nuntempe ni ĉiuj forte bezonas la laboron de la Monda Organizo pri Sano dum ĝi kontrolas KOVIM-19, kunordigas la lukton kontraŭ ĝi kaj unuigas sciencistojn tra la mondo por serĉi ĝian preventon kaj kuracon.

Sed neniu tiu agado estas plene internacia; neniu ekzistus sen la libera kunlaborado de la diversaj landoj de la mondo. Unuiĝintaj Nacioj, inkluzive de la multaj organizoj kiuj formas parton de la UN-familio, dependas de la aktiva subteno, kunlaboro kaj financado de la unuopaj ŝtatoj.

Tamen, ne malofte oni renkontas homojn kiuj kredas, ke la mondo estus pli bona se Unuiĝintaj Nacioj ne ekzistus, ke ĝi nur paroladas, ke ĝi nur limigas la suverenecon de la individuaj ŝtatoj. Ili kredas, ke ĉiu ŝtato prefere estu libera agi precize kiel ĝi volas.

Tio eble funkcius por kelkaj demandoj, sed ne por multaj. Klimatŝanĝiĝo, pandemioj, naturaj katastrofoj, internacia financo – ĉiuj tiuj demandoj ne konas landlimojn, postulas internacian kunordigon. Granda parto de tiu kunordigo okazas pere de Unuiĝintaj Nacioj.

Kvankam neniu organizo estas perfekta, foje la membraj ŝtatoj kulpigas Unuiĝintajn Naciojn pri la propraj mankoj aŭ punas Unuiĝintajn Naciojn per fortranĉo de mono kiu helpas ĉiujn membrojn de UN. Foje, estas pli facile kulpigi Unuiĝintajn Naciojn ol kunlabori kun aliaj UN-membroj por alfronti mondajn problemojn.

Oni ne povas solvi ĉiujn problemojn per duflankaj diskutoj inter ŝtatoj. Fakte, ju pli multe la mondo integriĝas, des pli multflankaj fariĝas ĝiaj problemoj. Ni bezonas multflankismon kaj kunlaborajn partnerecojn por fronti mondajn demandojn. Ĝustatempe António Guterres, Ĝenerala Sekretario de UN, alvokis, ke ni “antaŭenigu kaj subtenu reformitan, revivigitan kaj plifortigitan multflankan sistemon.” Tra la tuta mondo nun vidiĝas danĝera retiriĝo el multflankismo, falo de fido je internacia ordo kaj kresko de naciismo kaj konkurado.

En la nuna danĝera mondo, fronte al pandemio, al vasta dislokiĝo de homoj, al milita konflikto, al senpluvecoj kaj inundoj, ni bezonas multflankismon tian, kian ĝin praktikas Unuiĝintaj Nacioj, pli ol iam ajn antaŭe. Ni bezonas vortojn prefere al perfortoj, humanan kunlaboron prefere al konkurenco, malavaron prefere al amasigado de varoj, interkomprenon prefere al malamo.

Kaj ni bezonas pli bonan aliron al lingva diverseco, fortigon de multlingvismo en la sino de UN, klaran komprenon de lingvaj rajtoj ene de la ŝtatoj, kaj neŭtralan internacian lingvon por egaligi la lingvaj rilatojn inter la ŝtatoj.

Unuiĝintaj Nacioj estas unu el niaj plej fortaj remparoj kontraŭ kaoso kaj konfliktoj. Ni pli multe utiligu ĝin, ne malpli.

Gazetaraj Komunikoj de UEA, N-ro 867 2020-04-24



Tutmonda tago de libroj kaj aŭtoraj rajtoj

La kronviroza epidemio rompas multajn planojn de esperantistoj, kiuj klopodas nun laŭeble apliki alternativajn agadformojn por ne kontagi la virusan malsanon. En la aprila kalendaro estas tago, kiun esperantistoj povas tre aktive uzi informcele. En la nunaj kondiĉoj, draste limigantaj la publikajn fortostreĉojn de esperantistoj, oni povas iniciati kelkajn retajn aferojn lige kun la Tutmonda tago de libro kaj aŭtoraj rajtoj. Karaj gelistanoj, viaj ideoj estas bonvenaj.

Ekzemple, oni povas salutvorte mesaĝi al biblioteko aŭ al apartaj bibliotekistoj, kiujn amike kaj kunlabore kontaktas vi aŭ via esperantista societo.

Oni povas verki komenton pri legita libro de via ŝatata Esperanta verkisto kaj gratuli lin / ŝin okaze de la Tutmonda librofestoj.

Oni povas okazigi inter esperantistoj retan konferencon de legantoj pri unu libro. Ktp, ktp... Mi supozas, ke atentindaj variantoj multas. Mian tekston el la serio "Jarkalendaro kiel fonto de inform-motivoj por popularigi Esperanton" vi povas legi ĉe <https://vk.com/club59616356>

Vladimir Opletajev (Surguto)

Kiel ni esperantumas dum izoliĝo?

Espereble, tiu ĉi temo malaktualiĝos baldaŭ post apero de tiu ĉi “Ponto”. Tamen jam pasis pli ol monato ekde kiam multaj el ni restas hejme – senelire, senrenkontiĝe, senkunvene. Ĉu esperantista vivo ekstagnis — aŭ, samkiel multaj aliaj socioj kaj entreprenoj, malkovris novajn eblojn de komunikado? Estus interese konatiĝi kun la sperto de rusiaj esperantistoj en la novaj — ni kreu, portempaj — kondiĉoj.



Mi deziras rakonti al vi, kiel nun pasas EPoKo — la Esperanta Parola Klubo de MEA MASI. Kutime ĝiaj kunvenoj okazas unufoje dum ĉiu monato en iu kafejo aŭ alia, pli privata, ejo, nature, en realo. Tio ne eblas nun, do, ni, kiel multaj, eniris en virtualan mondon, elektinte fulme populariĝintan konversacian platformon ZOOM.

ZOOM estas favora por ni. Tre simpla en ekspluatado, kun bona sono kaj bildkvalito, ĝi permesas senpagajn retkunvenojn por multaj homoj kaj sen tempolimigo — se oni ne pigras realiĝi post ĉiuj 40 minutoj: iuj niaj kunvenoj senprobleme daŭris pli ol 2 horojn.

Jes, malgraŭ ke temas pri nur 5-6 semajnoj, ni havis ne 2 normalritmajn kunvenojn, sed 6 (se enkalkuli tiun ankoraŭ ne okazintan la 2an de majo). Do, jen la unua avantaĝo: nun ni kunvenas ĉiusemajne. La sama semajntago (sabato), la sama komenctempo (je la 16a horo) kaj la sama retadreso de la renkontiĝoj (<https://us04web.zoom.us/j/383191440>) reduktas organizajn zorgojn.


Tio estas la avantaĝo du. La tria: la retkunvenojn partoprenas signife pli da homoj, ol la realajn: de 12 ĝis 17. Kvara avantaĝo estas ĉeesto de tiuj personoj, kiuj neniam vizitadas realajn kunvenojn — sed el kutimaj vizitantoj ni perdis neniun. Ankoraŭa

avantaĝo estas ebleco ne nur akcepti aliurbanajn kaj eksterlandanojn, sed ankaŭ orientigi la programon al invitataj gastoj, ajne foraj. Fine menciindas, ke oni ne malŝparas tempon por la vojo kaj ĉiu rajtas veni-foriri ajnan momenton. Tiu lasta avantaĝo speciale gravas por rapide laciĝantaj komencantoj kaj homoj, devintaj okupiĝi pri aliaj aferoj.

Nun pri la enhavo de niaj virtualaj renkontiĝoj.

Nu, ĉar temas pri parola klubo, dezirindus, ke ĉiu veninto havu ŝancon paroli, speciale tiuj, kiuj bezonas koncernan praktikon.

La unua virtuala kunveno okazis la 28-an de marto kaj havis neniun temon. Ĝi estis multsence testa. Entuziasmaj MASianoj sufiĉe vaste distrumpetis pri ĝi, kaj venis surprise multaj eksterlandanoj. Sufiĉe multan tempon postulis salutadoj kaj konatiĝoj, la babilado cirkulis ĉefe ĉirkaŭ spertoj pri la provirusaj izoliĝoj. La kunveno daŭris horon kaj estis nefacila por la moderiganto, kiu devis ĉiam elpensi, per kio kaj kiel vigligi homojn, tiel ke “neniu foriru ofendita”. Tamen la ĉeestintoj restis kontentegaj, neniu deziris disiĝi kaj ĉiuj adiaŭis kun espero pri novaj renkontiĝoj. Sed ne okazis: sekvan fojon la aŝiso aperis nur en MASIAj retresursoj, pri kiuj aliuloj ne estas informitaj. Tamen tiu fakto ne reduktis la rondon: venis pli da MASianoj kaj rusianoj. Estis libera babilado, konservinta iom da kaoso, ĉirkaŭ anticipe anoncita temo: “Hejmaj bestoj”.



La tria kunveno signis plian stabiligon kaj akiron de pli firma direkto. La sekvaj kunvenoj estis jam tute bone formiĝintaj: la moderiganto anticipe kompilis proponojn pri kontribuadoj, kaj amaso da tiuj vere ĝojigis. La temoj de la kunvenoj 3, 4 kaj 5 (“Muziko”, “Libroj en Esperanto”, “25-a de aprilo: festoj kaj eventoj”) estis bone prilumitaj de preskaŭ ĉiuj aliĝintoj. Rezulte niaj kunvenoj duoble longiĝis. Detalajn programojn de ĉiuj kunvenoj kaj raportojn pri ties paso kun fotoj eblas trovi en VK-paĝaroj de MASI (https://vk.com/mea_masi, <https://vk.com/epoko>).

Ret-aktivadoj de MASianoj ne limiĝas ĉe Parolaj klubkunvenoj. La 16-jara lerneĵano Roma Ralko daŭre kaj entuziasme fiŝas per la reto novajn kaj novajn geknabojn, mem lernantajn Esperanton aŭ interesiĝantajn pri la lingvo. Li kreas por ili konversaciejojn en VK, private konsultas pri Esperanto-gramatiko, faras senpagajn lecionojn ks. Momente pli ol 25 geknaboj (el kiuj ĉ. 15 moskvanoj) turniĝas en lia orbito.

Persiste lernas Esperanton nova MASIanino Jelizaveta Vorobjova, la disĉiplo de lingvotrejnisto Alan Bigulov. Pri siaj evidentaj sukcesoj en Esperanto-lernado ŝi rakontadas al aliaj sekvantoj de Alan, kiuj studas aliajn lingvojn laŭ lia metodo. Liza faris jam tri filmetojn por pruvi sian rapidan lingvan progreson, kie ŝi parolas en Esperanto pri diversaj temoj. Du studentinoj de la 2a lernejo studas Esperanton per skajpo kun Irina Gonĉarova. Mem Irina estis dum 20 minutoj intervjuita pri Esperanto en radiostacio de intelektuala lernejo "Mnogoletovo" por aĝaj lernejoj. Novaliĝinta al MASI memlernanto Valerij Serdjuk dum la izoliĝo kreis jam tri popularig-instruajn filmetojn pri Esperanto. Kelkaj MASianoj partoprenis virtualajn internaciajn konversaciejojn kaj prelegejojn. Do, la izoliĝo estis sufiĉe fruktodona tempo por MASianoj. Kaj kiel vivis-agis dum tiu tempo vi?

*Irina Gonĉarova,
kunordiganto de MEA MASI,
moderiganto de virtualaj EPOKoj*

Instruado

Ĉu Esperanto estu ie la dua instruata lingvo en lernejoj?

(laŭ spuroj de la artikolo "Alvoko al la enlernejaj Esperanto-instruantoj", n-ro 12, 2019 de "Esperanto" redaktoroj)

De la jaro 2018 rusia ministerio de klerigado ordonis pri normo instrui en rusiaj mezlernejoj po du fremdlingvojn. Pro tio estas interese scii, mi pensas, kaj por multaj esperantistoj-instruistoj, ĉu iu estrarano de REU turnis sin al la ministerio por ekscii la detalojn. Ekzemple, klopodi pri eblecoj igi Esperanton dua lingvo en mezlernejoj, kaj klarigante tie pri sperto de Hungario, eble, de aliaj landoj (se tiaj nun estas). Ankaŭ pri grava eco kaj rolo de Esperanto kiel propedeŭtika rimedo en lernado de fremdlingvoj. Se okazus oficiala aprobo kaj permeso instrui Esperanton en lernejoj kun la planoj kaj salajrataj Esperanto-instruistoj, tio estus ankaŭ granda atingo kaj granda popularigilo de Esperanto, precipe por gejunuloj. Ankaŭ estas interese, ke post la eksperimento en Ijevsko antaŭ dek jaroj, ĉu iu ie en rusiaj mezlernejoj sukcesis instrui Esperanton profesie en lernejo? Ŝajnas, ke ne.

Kun samideana saluto kaj bondeziroj,

Anatolo Ivasenko, prezidanto de Krasnodara Esperanto-klubo.

Ekstera informado

Unu leciono pri Esperanto por ĉiu lernejo en la tuta mondo

Informa kaj instrua strategio subtenata de ILEI

(Bonvolu dissendi al viaj landaj kaj lokaj listoj kaj aliaj komunikiloj)

En la retejo www.ilei.info vi trovas la kompletan programon, inkluzive la leteron, kiu iru al decidantoj pri edukado je ĉiu nivelo (urba, provinca, kantona, ŝtata): lernejestroj, instruistoj, lingvoinstruistoj, gazetoj por instruistoj, sindikatoj por instruistoj, lertigejoj por instruistoj, universitatoj, lingvocentroj, aŭtoroj de lernolibroj, eldonistoj de lernolibroj, institutoj, kiuj okupiĝas pri edukado, plurlingvismo k.s.

Kiu donu tian lecionon? Povas esti iu esperantisto, kiu ricevas permeson eniri lernejon kaj fari la laboron. Povas esti iu instruisto, kiu helpe de la disponigita materialo prezentas Esperanton al sia klaso. Povas esti iu lernanto, studento, kiu helpe de la disponigita materialo prezentas Esperanton kaj/aŭ esploras mem cele al prezento en sia klaso/grupo.

Ni rememoru gravan parton de la dua UNESKO-rezolucio de 1985: "UNESKO invitas la Membroŝtatojn marki la centjariĝon de Esperanto per konvenaj aranĝoj, deklaroj, eldono de specialaj poŝtmarkoj kaj simile, kaj instigi al la enkonduko de studprogramo pri la lingvo-problemo kaj pri Esperanto en siaj lernejoj kaj siaj institucioj de supera edukado". La programo UNU LEClONO taŭgas por ĉiuj ekde la aĝo dek.

Ĉio pri la iniciato troviĝas ĉi tie: <https://www.ilei.info/agado/projektoj.php>

Gazetaraj Komunikoj de UEA, N-ro 858 2020-03-29

Varbado de pensiuloj



La 5-an de marto 2020 en la urba societo mi prelegis al la grupo de geemeritoj pri memor-kapabloj kaj pri Esperanto. Ĉeestis dudek du homoj. Enkadre de la prelego mi larĝe priskribis eblecojn, kiujn povas doni Esperanto, kaj montris al ĉeestantoj du interesajn filmetojn. Ili vigle ekinteresiĝis pri nekonata lingvo kaj multe demandis min. Kvar personoj esprimis deziron lerni Esperanton. Nun mi komencas kompili kurson de lekcionoj pri Esperanto... Ĝi estas nova, malfacila, sed interesa afero por mi.

La 19-an de marto 2020 en la kafejo mi renkontiĝis kun kvar aktivaj pensiulinoj, kiuj ekvolis lerni Esperanton. Mi ankoraŭfoje mallonge rakontis pri la lingvo kaj donis al ili du lecionojn el lernolibro de A. Junusov. Dum la renkontiĝo estis montrita la folia gazeto el Stokholmo kun anonco pri kafejaj esperantaj renkontiĝoj. Poste ni spektis la filmeton pri historio de Esperanto kaj filmon pri Esperanto-grupo en Atlanto (Usono). Ĉiuj estis kontentaj kaj diris, ke volas daŭrigi sian lernadon.

Eŭgeno Bojĉin (Birobiĝano)

Aranĝoj

MES – Mediteranea Esperanta Semajno.

Ho, kiel bela estas Lazura bordo sub la radioj de marta suno! Kia granda deziro senfine vagi laŭ la mara bordo kaj admiri fabelan bildon. Ankaŭ en ŝtormaj tagoj belas ŝaŭmantaj, muĝantaj ondoj. En tiu ĉi paradizo, nomata *Les Issambres*, okcidente de Nico, kunvenis centoj da esperantistoj el 10 landoj por studi la lingvon kaj amuziĝi dum la 14-a MES. Ankaŭ rusianoj partoprenis: 7 homoj el Novosibirsk, 2 el Ufa, 1 el Volgograd kaj 1 el Tiĥvin. Vetero – +14-16 gradoj, iam pluvis, tamen – varme!

Min surprizis la fenomeno, kiun mi malofte vidis en niaj tendaroj. Ĉiuj partoprenantoj senprokrase, entuziasme dividiĝis en 4 grupojn laŭ sia lingva nivelo kaj tre disciplineme vizitadis siajn kursojn ĝis la fino de la semajno. La plej spertan grupon 4, kiun eniris preskaŭ 40 homoj, inkluzive Nina



pandemio...

Cvileneva kaj mi,

instruis kaj amuzis Mikaelo Bronŝtejn. Hura!

Kiom da novaj scioj kaj ĝuo li donis! Dankon al li! Lernohoroj okupis la lernantojn ĝis tagmezo kaj iomete vespere. Ankaŭ vespere okazadis prelegoj, filmoj, dancoj. Certe, ankaŭ ni kontribuis la vesperajn aranĝojn per filmoj kaj rakontoj; ekzemple, pri mia urbo Volgograd mi faris filmon kun esperanta akompano. El ĉio plej plaĉis al mi la koruso, kiu provkantis ĉiutage, kaj dum la Adiaŭa vespero ni prezentis du kantojn. Ties gvidanto Bernard Bigonnet impresis min per sia alta profesieco, strikta postulemo kaj inteligenteco. Plia granda plezuro kaj logaĵo de MES estas la frandaj kaj abundaj pladoj, salataĵoj, fruktoj, tortoj, senpaga vino. "Sveda tablo" donis bonan ŝancon por babili kun francaj amikoj pri nomoj de pladoj, kiujn ni gustumis la unuan fojon (eble ankaŭ la lastan☺). La 7-n de marto ni adiaŭis kun novaj amikoj. Ni revenis hejmen sanaj, sed dumvoje jam konstatis la danĝerojn kaj limigojn de la proksimiĝanta



Tatjana Vtorova (Volgogrado)

UEA informas

La Universala Kongreso en Montrealo prokrastita al la jaro 2022

UEA esperas, ke ĉiuj bone fartas. La sano de la kongresanoj kaj de ĉiuj homoj estas por ni la plej alta prioritato. Post zorga konsiderado de ĉiuj aspektoj de la [koronavirusa](#) tutmonda epidemio kaj ĝiaj sekvoj, la Estraro de UEA, la Centra Oficejo, LKK kaj la kongresejo en Montrealo venis al la konkludo, ke tute ne estus sekure kaj prudente okazigi la UK-on en Montrealo en 2020. Cetere, laŭ la novaj pli striktaj reguloj de la kebekia registaro, je nia granda bedaŭro en 2020 ne eblas okazigi Universalan Kongreson de Esperanto.

Pro tio la Estraro de UEA unuanime decidis prokrasti la Universalan Kongreson en Montrealo al la jaro 2022.

Ni kore dankas al la Loka Kongresa Komitato (LKK), kiu dum jaroj obstine laboris por organizi la Kongreson kaj pretas daŭrigi la laborojn por la UK en Montrealo en la jaro 2022.

Ĉiu aliĝinto estis rekte informita de la Kongresa Fako de UEA rilate la prokraston al 2022, la aŭtomatan nuligon de mendoj kaj la repagojn.

Por ke la esperantistoj tamen havu la okazon sperti grandan internacian aranĝon en tiu ĉi jaro, estas planata virtuala evento en la monatoj julio-aŭgusto, kiun povos partopreni ankaŭ tiuj, kiuj ne planis veni al Montrealo.

Gazetaraj Komunikoj de UEA, N-ro 862 2020-04-11

Jarkolektoj de la revuo Esperanto liberaj por elŝutado

UEA informas, ke aldone al la libera elŝuteblo de la n-ro 4/2020 de Esperanto (per uea.org/revuoj) ankaŭ eblas libere elŝuti ĉiujn jarkolektojn kaj numerojn de pli ol antaŭ unu jaro disponeblajn en la retejo de UEA.

La retejo nuntempe provizas la jarkolektojn ekde 2002. Trovu ilin ĉe uea.org/revuoj/esperanto. Por elŝuti la liberajn numerojn oni devas musklaki la butonon "Elŝutu la numeron". Ne necesas ensaluti por numeroj de pli ol antaŭ unu jaro: tuj post la musklako la retejo postulos nur kontrolkodon por permesi al vi elŝuti la elektitan numeron. Por la Jarkolekto 2019 elŝuteblas nuntempe de la januara ĝis la marta numero. Por la jarkolekto 2020 eblas elŝuti la aprilan numeron de 2020: uea.org/revuoj (libere, sen la postulo ensaluti aŭ entajpi kontrolkodon).

Bela novaĵo estas ankaŭ tio, ke ĉiuj **voĉlegitaj numeroj** de antaŭ pli ol unu jaro estas same libere aŭskulteblaj: uea.org/revuoj/sono – kune kun la voĉlegita aprila numero de 2020. La voĉlegado estis reprenita de la pasinta Estraro de UEA, sub kunordigo de la tiama estrarano Emilio Cid, kaj pro tio ne ĉiuj numeroj estas voĉlegitaj. Nuntempe kunordigas la voĉlegadon Luis Obando kun teamo de volontuloj. La ĉefa celo de tiu grava laboro estas provizi la enhavon de la revuo al vidhandikapitoj. Se vi volas kontribui per legado, kontaktu luis@esperanto.co. Se eblas al vi donaci por tiu celo, via subteno bonvenas per donaco al la Volontula Fondaĵo: uea.org/alighoj/donacoj/volontuloj.

Nia Asocio sincere esperas, ke la komunumo ĝuos tiujn eblojn. Samtempe ni kuraĝigas (re)membriĝi por **subteni** la laborojn de la Asocio per nia reta aliĝilo: uea.org/alighoj/alighilo. Membroj malpli aĝaj ol 36 jarojn estas konsiderataj TEJO-membroj kaj aŭtomate ricevas ankaŭ la revuon Kontakto. En la kategorio Baza homoj malpli aĝaj ol 26 kaj 20 jarojn ricevas grandajn rabatojn, respektive de 50% kaj 75%. Homoj pli aĝaj ol 35 jarojn povas aboni la revuon Kontakto papere aŭ elektronike ekde nur 6 eŭroj jare: uea.org/alighoj/abonilo (aŭ alternative fariĝi patrono de TEJO per la reta aliĝilo). Se eblas al vi, konsideru ankaŭ donaci al Fondaĵo Canuto, kiu helpas la Asocion membriĝi homojn en nepagipova situacio aŭ kun transpagaj baroj. Per ĝi ni membriĝas ĉefe junulojn kaj virinojn. Donacoj tiucele eblas per: uea.org/alighoj/donacoj/canuto.

Fine ni invitas ĉiutage viziti la **retan revuon Esperanto** per revuoesperanto.org, kie eblas legi artikolojn de la papera eldono samkiel ekskluzivajn rubrikojn kaj aliajn novaĵojn. Ekde ĝia lanĉo ĝi prezentas al la publiko averaĝe po 1 artikolo por tago, kaj jam sufiĉe multe da artikoloj estas por esploremaj novaj legantoj.

Speciale en ĉi tiu epoko UEA esperas, ke ĉiuj esperantistoj kaj ties familianoj kaj amikoj bonfartas kaj estas en sekureco. Nia Asocio staras por solidarecaj valoroj kaj kontraŭ ĉiaj diskriminacioj. La revuo Esperanto, legata en pli ol 120 landoj, ekde sia fondo en 1905 kaj oficialigo kiel organo de UEA en 1908 estas je la dispono de la komunumo por tio, kaj ĉiuj estas bonvenaj kontribui al la revuo.

Gazetaraj Komunikoj de UEA, N-ro 863 2020-04-16



FILMO "VIZITO AL LA CENTRA OFICEJO" LIBERE SPEKTEBLA

La Malfermaj Tagoj de la Centra Oficejo de UEA kaj TEJO (mallonge MT) okazas dufoje jare, kutime en iu aprila kaj novembro sabato, ekde novembro 1994. La 52-a MT estis planita por okazi ĉeeste la 25-an de aprilo 2020, sed pro la tutmonda koronavirusa epidemio UEA devis anonci ĝian nuligon komence de marto. Tamen kiel informite en la [GK864](#), bona novaĵo estas, ke – danke al la kunlaboro de la stabo de la Centra Oficejo, la Estraro de UEA kaj bonvolemaj anoj de nia esperantista komunumo – la 52-a MT povos ja okazi en la planita dato, sed **virtuale**. La proponita programo de tiu MT strebos konservi la tradiciajn elementojn de la evento kaj ĝian kutiman etoson.

De gastlibro kaj loterio ĝis rabatoj en la Libroservo de UEA kaj la atendataj prelegoj, la organiza teamo provizas rimedojn por virtuale realigi la agrablajn momentojn, kiuj okazas dum la vizito al Roterdamo kaj al la CO okaze de la malfermaj tagoj. Tial la tuta enhavo de la DVD *Vizito al la Centra Oficejo*, preparita dum la 23-a MT la 26-an de novembro 2005, estas nun libere spektebla en la kanalo de UEA ĉe YouTube, UEA Viva: youtube.com/UEAViva (vi estas bonvena aboni la kanalon).

Kvankam la CO aspektas relative malsame en 2020, la ĉefa filmo de la DVD havas veran historian valoron: ĉar ĝi estis produktita en la jaro 2005, kiam la CO festis sian 50-jariĝon en Nederlando post translokiĝo el Britio en 1955. Per ĝi eblas kapti la esencon de la laboro de la CO por UEA kaj Esperanto. Krom la ĉefan filmon, esperantistoj povos ĝui ankaŭ la aliajn erojn de la DVD: *Konciza bild-historio de la Centra*

Oficejo, Bild-galerio: "Malferma tago en CO" kaj Malantaŭ la kurteno.

La referenca vendoprezio de la [DVD Vizito al la Centra Oficejo](#) estas 9,00 €. Tial ni alvokas ĉiujn subteni la aperigon de tiu materialo en nia kanalo per laŭvola – samvalora aŭ ajna – donaco al UEA. Por scii kiel sendi vian donacon vizitu: uea.org/alighoj/pagmanieroj.

Donacinte, bonvolu sendi mesaĝon al financoj@co.uea.org kun averto, ke via kontribuo estas por la “52-a MT”. Ni uzos la kontribuojn por donaci la fizikajn diskojn el la stoko al instruistoj kaj esperantistoj, kiuj povas utiligi tiun materialon! en sia agado. Nia celo estas per tiu alvoko atingi la minimuman sumon de 330 €. Laŭnoma danko al donacintoj aperos en la revuo Esperanto sub la rubriko "Oficiala informilo" (por aboni la revuon [membriĝu en UEA/TEJO](#)).

La Estraro de UEA kore dankas al la eldonejo [Espero](#), kunposedanto de la kopiraĵto, kiu konsentis pri la disponigo de la enhavo de la DVD, speciale por tiu virtuala MT. La programon eblas sekvi ĉe: eventaservo.org/e/mt52. La disponigo de la filmo havas apartan signifon en tiu periodo, dum kiu provizore ne eblas viziti la Centran Oficejon, kaj estas ankaŭ simbola agnosko de la valora agado de la CO, kiu daŭre laboras por la Asocio kaj la membroj, i.a. bonorde ekspedas revuojn kaj libroservajn mendojn, eĉ se en kelkaj kazoj povas okazi malfruoj pro enlandaj poŝtaj limigoj.

Gazetaraj Komunikoj de UEA, N-ro 865 2020-04-22

BET-56 prokrastita unu jaron

La jaro 2020 eniros en la historion per tutmonda lukto kontraŭ malsano Covid-19 kaŭzita de la nova koronaviruso. En Latvio daŭras la eksterordinara situacio, kio malpermesas organizi publikajn eventojn. Tio malebligas al la organizantoj de la 56-aj Baltiaj Esperanto-Tagoj (BET-56) efektiviĝi la aranĝon. Tial laŭ interkonsento kun la prezidantoj de la Estona kaj Litova Esperanto-Asocioj Organiza Komitato decidis prokrasti BET-56 al 2021. La loko restos la sama – Jelgava, datoj: de la 3-a ĝis la 10-a de julio 2021. Al la dezirantoj malaligi la kotizo estos repagita. Same oni pretas repagi la antaŭpagitan monon pri loĝado kaj manĝado. Ĉiu aliginto ricevos informon retmesaĝe. Ni ĉiuj havu fortan sanon, bonan humoron kaj renkontiĝu dum BET-56 en 2021.

*Margarita Želve, Prezidantino de Latvia Esperanto-Asocio
El: EKO 2020-20 sendita el Budapeŝto, la 30an de aprilo*

Novaj eldonaĵoj de REU

La plej bonaj tagoj de nia vivo

La unua eldono de tiu ĉi libro aperis papere en 2018:

«Лучшие дни нашей жизни: о языке эсперанто и не только» [б.м.]: Издательские решения, 2018. – 120 с. ISBN 978-5-4493-1399-7.

La eldonkvanto rapide elĉerpiĝis, kaj aperis aldonaj artikoloj, abundego da fotoj kaj pliiĝustigoj, tial, laŭ la peto de la kompilintino, Tatjana Auderskaja, REU decidis entrepreni la novan, sed, bedaŭrinde, nur elektronikan, eldonon de la libro. Ĝi estas atingebla por ĉiuj en la paĝaro de REU (www.reu.ru).

Kion celas la libro? Unue, ĝi estas ruslingva kaj estas dediĉita kaj al ruslingvaj esperantistoj, kaj al ĉiuj, kiuj interesiĝas pri Esperanto kaj vivo de esperantistoj – do, povas servi kiel bona varbilo. Bona priskribo de tio, kion donas scio de Esperanto al la partoprenantoj de la movado estas tre elokventa varbilo. Opinioj de neesperantistoj, kiuj kun la libro konatiĝis, tiun aserton pravas. Bedaŭrinde, ke tute ne ĉiu homo, al kiu tiu libro plaĉas, tuj strebas esperantistiĝi... Sed tio estas alia temo.

Due, ĝi estas belega kolekto de historiaj materialoj pri nia movado. Kompreneble, unuavice temas pri movado en Odeso, kie loĝas la kompilantino (kaj aŭtorino de pli ol duono de la eseoj en la libro), sed tute ne nur. Mi diru, tio estas vido de la tutsovetia kaj postsovetia movado el la konkreta loko, kio permesas kompreni ĝin subjektive kaj – pro tio, dialektike, pli objektive pritaksi. Pro tio la historia signifo de la eseoj nur gajnas.

Trie, ĝi tre utilas al la novaj generacioj de esperantistoj, kiuj povas ĉerpi el la libro spertojn, kiujn eblas uzi kaj modifi por novaj cirkonstancoj. Jes, la mondo ŝanĝiĝas, sed la malnovaj atingoj povas sugesti ion gravan kaj utiligeblan ĉu nun, ĉu en iaj postaj epokoj.

Do, legu la libron por propra plezuro kaj utilo, prenu kaj uzu ĝin por viaj neesperantistaj amikoj, kiujn vi volus esperantigi!

Kaj la fina rimarko. La elektronika eldono havas kelkajn avantaĝojn. Unu el ili estas relativa facileco ĝin perfektigi. Do, sendu viajn sugestojn, pliiĝustigojn, aldonajn kontribuojn al la kompilinto verda99@mail.ru aŭ/kaj redaktoro nikolao@yandex.ru (kun la temlinio “la plej bonaj tagoj”) – pro tio, se aperos la deziro, ni povos fari la novan, perfektigitan, eldonon.

Nikolao Gudskov



Esperanto: Esprimilo homa

Parolado de Humphrey Tonkin al la 7-a Irana Esperanto-Kongreso, 18 aprilo 2020 (okazinta rete per Zoom).

Tutunue mi diru al vi kiel granda plezuro estas havi okazon alparoli iranajn esperantistojn. Mi tra multaj jaroj sekvis la Esperanto-agadon en Irano – fakte ekde la mezaj 1970aj jaroj. Mia sola vizito al Irano, en 1977, konvinkis min ne nur pri la efika agado de la iranaj esperantistoj por Esperanto sed ankaŭ pri la gastamo kaj progreso de la lando. Ni nun troviĝas en periodo de krizo politika kaj saneca. Ĉu eble la nuna pandemio instruos al ni denove kiel grave estas konservi la homan vivon, kiel esence estas, ke ni kune laboru por la bono de la homaro? Ĉu eble unu krizo, tiu pri la korona viruso, povus konvinki nin forigi alian – tiun pri politika dividiĝo, malamo kaj sensenca elspezo de energio je eterna disputado? Kaj ĉu la mesaĝo de Esperanto povus rapidigi la alvenon de la paco? Ni povas almenaŭ tion esperi.

Mi volas paroli hodiaŭ pri temo eble iom abstrakta sed tamen grava – la ekesto de Esperanto kaj ĝia rolo en nia moderna mondo. Samtempe tiu ĉi estas prelego, ne inspira parolado. Espereble vi pretos atenti kaj mi povos diri al vi ion novan...

Iom da historio

En la tempo de Zamenhof, tri lingvoj havis proksimume egalan influon en la aferoj de Eŭropo: la franca, la germana, la angla.

Francaj intelektuloj de tiu epoko ligis la francan lingvon al la klasika tradicio, konsiderante sin la heredantoj de la granda Roma Imperio kaj la gloroj de la latina lingvo. La franca ĝuis altan prestiĝon.

Germanaj intelektuloj same identigis sin kun la klasika tradicio. Sed por ili temis pri pli vasta tradicio: ili identigis sin ne nur kun la latina sed ankaŭ kun la greka: fakte kun la hindeŭropaj lingvoj ĝenerale. La eltrovo de la hindeŭropa “familio” de lingvoj estas atribuebla al britaj funkciuloj en Hindio fine de la dekoka jarcento, sed ĝi estis aparte kaptita de la germanlingvanoj, kiuj baldaŭ sin identigis kun la integrigo de la sanskrita kaj la persa en la intelektan kaj filologian historion. Interalie la germanoj komencis vastajn arkeologiajn esplorojn tra Mezoriento. Samtempe, kaj eĉ pli decide, ili ankaŭ kreis la koncepton de la “esplora universitato” kie dominis ne tiom la instruado de junuloj kiom la scienca esplorado.

La angla lingvo gajnis vastan adeptaron pro ekonomia kresko de Britio kaj de Usono kaj la samtempa ekspansio de la kolonioj, precipe Aŭstralio kaj Kanado, kaj sekve de tutmonda komerco. Ankaŭ Francio simile ekpansiiis, la germanaj ŝtatoj kaj poste la unuigita Germanio malpli. Sed la germana siavice ĝuis gravan pozicion en la scienco (inkluzive medicinon), kaj la franca en la mondo de internacia diplomatio. Usono baldaŭ kaptis de la germanoj la ideon de universala universitato, samtempe dediĉita al instruado kaj esplorado, kaj kun emfazo je doktoraj studoj. Tio do ankaŭ fortigis la anglan lingvon.

Ne nur tio: kresko de moviĝo ene de Eŭropo, kune kun kresko de klerigo, kreis lingvajn problemojn kie ili ĝis tiu punkto apenaŭ ekzistis: la germana regis en Centra Eŭropo, la franca en okcidenta Eŭropo. En Orienta Azio, kune kun la industriigo de Japanio, kreskis la influo de la japana. Simila ekspansio okazis rilate la araban, sed temis pri esence religia ekspansio. La ekspansio de la araba kaj la japana estis plejparte regionaj fenomenoj, same kiel la pozicio de la turka, la persa, la hindia k.s. La ĉefaj eŭropaj lingvoj tamen aspiris al tutmonda influo.

En tiun konfuzon de lingvoj plonĝis Zamenhof. Kvankam abundas ĝermanaj radikoj en Esperanto, Zamenhof identigis sin kun la latina kontinuo, kiun siavice apogis la francaj intelektuloj: la gramatika sistemo de Esperanto, kvankam draste simpligita, similas tiun de la latinidaj lingvoj. Nur en lastaj jaroj oni klarigis, ke je pli profunda nivelo tiu gramatiko havas elementojn similajn al ekzemple la ĉina.

La leksikon Zamenhof prenis ĉefe el la latinidaj lingvoj, la semantikon el la ĝenerala semantika provizo de la eŭropaj lingvoj...

Alivorte dirite, Zamenhof ekspluatis la propran scion de lingvoj, sed kun emo ligi sin al la (laŭ reputacio) intelekto kaj literature supera franca lingvo – do ne al la germana lingvo kaj ties branĉoj, malgraŭ tio, ke la patro estis instruisto de la germana. Eĉ oni povus argumenti, ke certagrade Zamenhof reagis *kontraŭ* la germana.

Ne mankas influo de la rusa kaj rusdevenaj lingvoj en Esperanto, en la vortprovizo, la semantiko, kaj la kutima uzado, sed al tiuj lingvoj mankis la prestiĝo identigebla kun la franca – kaj Zamenhof tre konscie celis krei prestiĝan lingvon, kiu superu la kutimajn kritikojn kontraŭ arte kreitaj lingvoj, ke ili estas nur limigitaj esprimiloj sen beletraj kaj historiaj tradicioj. Nur tiel li havus ŝancon akiri la subtenon de la opiniformantoj.

Evidente, Zamenhof uzis lingvajn elementojn kiujn li konis, kaj atentis pri la grandaj fluoj en la filologio kaj lingvistiko de la periodo. La identigo, fine de la dekoka jarcento, de komunaj radikoj inter la latinidaj kaj ĝermanaj lingvoj unuflanke kaj la sanskrita kaj la persa aliflanke, do la eltrovo de la “hindeŭropa lingva familio”, nur plifortigis la decidon de Zamenhof identigi sin kun la franca lingvo, kies intelektuloj spuris la propran lingvan pasintecon de la latina lingvo de Vergilio kaj Horaco, pere de la frankoj de la regiono en la nuna orienta Francio kaj okcidenta Germanio, ĝis la t.n. “aŭtentikaj heredantoj” de la latina tradicio, nome la francoj.

Ĉu mi aldonu, ke iasence tiu tuta klasika tradicio estis blufu: spaca vojaĝanto en vizito al nia planedo antaŭ, ni diru, 2500 jaroj verŝajne elektus la persan aŭ la ĉinan por krei sian mondan lingvon?...

Sed, por reveni al mia kerna argumento...

Jen la esenca paradokso de Esperanto: ĝi celis tutmondan uzon, sed celis tiun tutmondiĝon en la kunteksto de eŭropa ekspansiismo – kaj la ekspansio de la hinda-persa-greka-romia influfero.

Perfekto aŭ utiligeblo?

Lingvistike, do, Esperanto ne estas neŭtrala. Fakte, se oni imagas neŭtralan lingvon kiel lingvon kiu enhavu etajn partetojn el ĉiuj regionoj de la mondo, la rezulto estus neŭtrala nur en la senco, ke tiu lingvo estus egale malfacila por ĉiuj popoloj. Kaj, cetere, eĉ se

PONTO n-ro 112, majo 2020

tia “tutmondeco” eblus en la vortprovizo, ĝi verŝajne ne eblus gramatike, kie ja necesas elekti unu sistemon super aliaj. Kaj semantike tia neŭtrala elekto kreus veran kaoson.

Zamenhof celis ne universalecon lingvan, sed facilecon kaj esprimkapablon – ne perfektan sed utiligeblon. Mi argumentus, ke li bone atingis tion.

La itala profesoro kaj verkisto Umberto Eco dediĉis signifan atenton al Esperanto en sia libro de antaŭ dudek kvin jaroj *La serĉado de la perfekta lingvo*. Sed eĉ se poetoj celas perfektan esprimovon en la kreo de siaj verkoj, kaj eĉ se iasence Zamenhof posedis la kreemon de poeto, lia celo en la kreo de Esperanto ne estis perfekteco sed utileco.

Mi ne povas tro forte emfazi tiun aspekton de Esperanto: ĝi ne estas perfekta lingvo, nek celas esti perfekta lingvo: ĝi estas lingvo por la facila utiligo de ni neperfektuloj, kiuj baraktas konstante kun lingvaj problemoj kaj lingva malegaleco.

Ĝi ne estas egale facile lernebla de la parolantoj de ĉiuj lingvoj. Dum ni parolantoj de la angla aŭ la persa povas trovi komunajn elementojn en la gramatiko de Esperanto, kaj dum parolantoj precipe de la angla trovas amason da radikoj kiujn ili konas, japanaj esperantistoj ne ĝuas tiun avantaĝon. Iliaj problemoj estas aliaj ol tiuj kiujn frontas ĉinoj, sed ankaŭ ili trovas la komencajn paŝojn malfacilaj.

Sed Esperanto estas multe pli facile lernebla ol la tielnomata internacia lingvo la angla – kaj la aliaj eŭropaj lingvoj.

Fakte, en la batalo de la lingvoj kiun Zamenhof frontis en la finaj jaroj de la deknaŭa jarcento, estis ĉefe la angla kiu grandparte sukcesis. La britoj kaj usonanoj (kune kun kanadanoj, aŭstralianoj ktp.) troviĝis ĉe la ĝusta flanko en du mondmilitoj, dum la germanoj malvenkis ambaŭfoje. Tio, en kombino kun la efiko de faŝismo en la 1930aj jaroj, esence detruis la avantaĝojn de la germana lingvo en la sciencoj. La francoj posedis vastan reton de kolonioj, sed nur la britoj sukcesis starigi fortajn memstarajn ĉefe anglalingvajn ŝtatojn en Aŭstralio, Novzelando, Kanado, Barato kaj Sudafriko. Dume la usonanoj vastigis sian ekonomian hegemonion tra grandaj partoj de la mondo kaj mem evoluigis la proprajn internajn edukajn kaj ekonomiajn fortojn.

En la diplomatio la batalo certagrade daŭris kaj daŭras. Decida estis la elekto de du oficialaj lingvoj en la Ligo de Nacioj en 1919-20: la angla kaj la franca. Post la invento de simultana interpretado kaj la fondo de Unuiĝintaj Nacioj, la nombro de lingvoj oficiale uzataj en Unuiĝintaj Nacioj kreskis ĝis ses, sed ĝis hodiaŭ la du laborlingvoj de la Sekretariato de UN restas la angla kaj la franca. Pli kaj pli dominas la angla. Samo okazis ankaŭ en la Eŭropa Unio, kie amasas la oficialaj lingvoj sed la angla fariĝas ĉiam pli forta.

Pasinteco kaj estonteco

Ĉu, do, Esperanto havas ŝancon? Ĉu tiu eta lingvo de Zamenhof, kiu neniam ĝuis la subtenon de la oficialaj instancoj nek la diversaj ŝtatoj, povas ludi rolon en la estonteco de la internacia vivo?

Unue necesas emfazi, ke en la 1880aj jaroj, kiam la batalo de la lingvoj flamis en la internacia vivo, Esperanto nur je tiu punkto ekestis. La regantoj de la grandaj ŝtatoj sisteme ĝin rezistis, argumentante, ke ĝi estas lingvo nur de kelkaj stranguloj kaj ke ĉiokaze ĝi havas nek la riĉecon nek la historion de la tielnomataj grandaj lingvoj. La subita kresko de la lingvo en la jaroj post la Unua Mondmilito estis esence nuligita ne de la limigoj de la lingvo mem sed, male, de ĝiaj kapabloj: la soveta registaro de Stalin, ektrivante, ke sovetaj civitanoj tro efike komunikas per Esperanto al eksterlando la mankojn de Sovetunio, fermis la movadon kaj persekutis ĝiajn subtenantojn; kaj faŝistoj ĉie ĝin kontraŭis. Post la Dua Mondmilito, la venkintaj ŝtatoj ne interesiĝis pri neŭtrala solvo de la problemoj de internacia komunikado, sed preferis en plej bonaj okazoj sin apogi per la novaj sistemoj de simultana interpretado. Sovetunio forte subtenis la rusan lingvon, kiu gajnis iom da influo en la sciencoj, sed kun la kolapso de Sovetunio kolapsis tiu influo.

Kaj hodiaŭ ne mankas parolantoj kaj uzantoj de la Internacia Lingvo: verŝajne estas pli da sciencoj de la lingvo hodiaŭ ol iam ajn en ĝia historio.

Samtempe ni frontas novajn defiojn. La antaŭenmarŝo de la teknologio draste faciligas la tradukadon kaj baldaŭ havos similan efikon je interpretado; la konkurenco inter la ŝtatoj plifortiĝis kaj la multflankismo reduktiĝis. Fakte, oni havas la impreson, ke, almenaŭ en la politiko, ju pli oni faciligas la interlingvan komunikadon, des pli oni uzas ĝin por reciproke insulti, por fortigi la propran pozicion koste de aliaj, por aserti la propran superecon...

Kaj ĉion ĉi oni faras meze de pandemio kiu minacas ĉiujn homojn, ĉiujn landojn, kaj en klimata krizo kiu povus detruai la planedon. Se tiel estas, tiuj kiuj kondamnas la zamenhofan lingvon kiel frenezajn estas mem frenezaj, kaj tiuj kiuj subtenas tiun lingvon saĝe komprenas fundamentan veron, nome la neceson sekvi la vojon de paco, de komuna interhelpo, kaj de universalaj solvoj al la problemoj kiuj minacas la planedon.

En la dektri jardekoj depost la kreo de Esperanto, tiu lingvo fariĝis plene esprimpova, plene kapabla kiel lingvo. Zamenhof saĝe transdonis la evoluon de la lingvo al ĝiaj uzantoj: li retiriĝis el sia rolo kiel kreinto de la lingvo kaj lasis la esperantistojn mem ĝin kultivi. Kiam iuj esperantistoj sugestis, ke oni povas plibonigi la lingvon, la plimulto de la uzantoj de la lingvo tamen daŭrigis la uzadon de la lingvo kiun ili jam lernis – ĉar jam en 1907, la jaro de la Ido-skismo, la lingvo, nur dudekjara, jam fariĝis plene uzebla lingva sistemo. La perfektistoj transiris al Ido kaj poste al diversaj aliaj eĉ pli “perfektaj” lingvaj sistemoj, kaj fine disipiĝis en la aeron kiel nura lingva nebulo. La veraj idealistoj, kiuj volis solvi la problemon de la lingvoj, restis fidelaj al Esperanto.

Mi jam sugestis, ke hodiaŭ Esperanto havas pli da scipovantoj kaj uzantoj ol iam ajn en sia historio. Tio okazas parte pro la Interreto, per kiu oni povas relative facile lerni la lingvon – kaj tre facile utiligi ĝin. En la reto abundas materialo en Esperanto, abundas metodoj por kunligi kun aliaj uzantoj de la lingvo, tiel ke kreiĝas virtuala lingva komunumo vere potenca.

La koncepto de egaligo

Sed en tiu situacio perfekteco estas malamiko de bono: oni povas tiel perfekte uzi la lingvon, tiel bone ĝui ĝin, tiel facile ligiĝi kun homoj en aliaj partoj de la mondo, ke oni forgesas, ke Esperanto estas pli ol lingvo por persone kontaktiĝi kun simpatianoj en aliaj landoj. Esperanto estas respondo al pli granda problemoj ol tio – nome al la esenca malegaleco de lingva komunikado en la mondo. Bele, ke oni praktikas lingvan egalecon en tiuj personaj kontaktoj; malbele, ke oni nesufiĉe atentis la fundamentan ideon malantaŭ Esperanto – tion kion oni povus nomi la egaliga ideo.

Kion mi celas per tiu nocio de “egaligo”? Ĉie en la mondo oni vidas ekzemplojn de la lingva diskriminacio. Tiu kiu posedas la anglan lingvon ne nur havas avantaĝon en la internaciaj aferoj per sia scio de tiu lingvo, sed povas uzi tiun scion por malavantaĝi aliajn. Facile la unuopaj usonanoj dungigigas en la sekretariato de Unuiĝintaj Nacioj, sed la ĉinoj (ekzemple) devas investi en tuta eduka sistemo por krei homojn kapablajn lingve konkurenci por tiuj postenoj. Kaj eĉ en plej bona okazo, denaska parolanto de la angla lingvo ĝuas avantaĝojn en la intertrakto, povas pli facile esprimi sin, povas pli facile persvadi.

Bedaŭrinde la fluaj nedenaskaj parolantoj de la angla lingvo estas tiel fieraj pri la propra scio, ke ili, konscie aŭ subkonscie, baras la vojon al siaj samlingvanoj per la propra lojaleco al la angla lingvo. La angla estas ne nur utila: ĝi estas ankaŭ prestiĝa – kaj prestiĝo dependas de la ekzisto de homoj kaj lingvoj al kiuj mankas prestiĝo.

Mi mencias Unuiĝintajn Naciojn ĉar, kiel reprezentanto de Universala Esperanto-Asocio ĉe UN, mi konas ĝin plej bone. Sed tio kion mi diras estas same aplikebla al ĉiuj flankoj de komerco, de diplomatio, de scienco: la uzo de naciaj lingvoj en internaciaj kuntekstoj estas esence neegaleca.

Fakte, la lingvoscio, kaj la prestiĝo aŭ manko de prestiĝo de unuopaj lingvoj, havas sian efikon je ĉiuj niveloj de la homa socio. Parolantoj de minoritataj lingvoj suferas diskriminacion kaj devas porti la ŝarĝon de lernado de dua lingvo por roli en la propra nacia socio. En multaj okazoj, iliaj lingvoj estas eĉ ne uzataj en lernejoj, kaj ili do devas akiri novan lingvon eĉ por edukigi. Ofte, la rezulto estas, ke ili estas porĉiame en malavantaĝa pozicio. Kaj la parolantoj de la domina lingvo laboras por sekurigi sian superan pozicion, ignorante la artajn kreaĵojn de tiuj minoritatoj, ekskludante ilin el la ekonomio, ekspluatante ilin.

Tio okazas ĉie en la mondo. Lingvoj estas unu el la ĉefaj motivoj de diskriminacio, forpreno de homaj rajtoj, bagateligo de aliaj. Kiel mi diris pli frue: prestiĝo dependas de la ekzisto de neprestiĝo; egaleco de tiuj en superaj pozicioj dependas de malegaleco de aliaj; supero supozigas malsuperon kaj malsupero supozigas superon.

Bedaŭrinde ni esperantistoj, ĝuante la lingvan donacon de Zamenhof, neglektas la disvastigon de la ideoj malantaŭ ĝi. Ne sufiĉas scipovi Esperanton: necesas uzi ĝin. Ne sufiĉas uzi Esperanton: necesas disvastigi ĝin. Ne sufiĉas disvastigi Esperanton: necesas disvastigi la fundamentan ideon malantaŭ ĝi – tiun de lingva egaleco. La problemo de lingvoj en la mondo ne estas nur problemo de kompreno sed ankaŭ problemo de socia ordo: por krei internacian harmonion oni bezonas internacian lingvon.

Tiuj estas grandaj ideoj. Indas ankaŭ malhisi ilin al la nivelo de ni simpluloj. Mia mesaĝo simplas: necesas labori por nia idealo per ĉiuj eblaj rimedoj, ĉar ĝi estas fundamenta elemento en la vojo al mondo pli kapabla fronti la problemojn kiujn ni ĉiuj frontas – la problemojn de sano, de milito kaj paco, de edukado, de egaleco, de klimata bonfarto – problemojn homajn, solveblajn per solvoj homaj – solveblajn ankaŭ per utiligo de egaliga kaj egaleca internacia lingvo.

Humphrey Tonkin

Konkursoj

Literatura Konkurso Hristo Gorov

Hristo Gorov (Hrima) estis unu el la plej elstaraj bulgaraj esperantistoj, talenta Esperanta verkisto, poeto, tradukisto kaj publicisto. Bulgara Esperanto-Asocio (BEA) anoncas Internacian Esperantan Literaturan Konkurson. En la konkurso povos partopreni geesperantistoj el ĉiuj landoj. La konkurso estos por **rakonto kaj eseo**.

Ĉiu aŭtoro rajtas partopreni per unu rakonto aŭ per unu eseo, originale verkita en Esperanto. La konkurso ne havas konkretan temon. La verkoj estu tajpitaj komputile kaj ĉiu aŭtoro nepre uzu la Esperantan alfabeton kun unikod-kongruaj supersignoj. La aŭtoroj indiku sian sekson. La verkoj estu subskribitaj per la vera nomo de la aŭtoro, aperu plena poŝtadreso, telefono kaj retadreso. La rakontoj kaj eseoj estu maksimume 3-paĝaj, formato A4, la litertipo estu Times New Roman 12-punktaj.

La gajnintoj ricevos valorajn premiojn.

Bonvolu sendi viajn kontribuojn ĝis la 30-a de septembro 2020 al: modest@abv.bg aŭ per poŝto al la adreso: Georgi Mihalkov, Sofio – BG-1229, “Vrabnica” 1, bl. 529 vh. A et. 9 ap. 33, Bulgario.

El: EKO 2020-20 sendita el Budapeŝto, la 30an de aprilo

Interlingvistiko

Interlingvistoj de la mondo unuiĝu!

La novaj eldonoj de IpI (Informilo por Interlingvistoj,) kaj IfI (ĝia anglalingva eldono: Information for Interlinguists) haveblas rete:

IpI (Esperante): Trovu la novan numeron kaj pli fruajn numerojn ĉe: <http://www.esperantic.org/eo/publikajoj/ipi/>

IfI (angle): Trovu la novan numeron kaj pli fruajn numerojn ĉe: <http://www.esperantic.org/en/publications/ifi-information-for-interlinguists/>

Informilo por Interlingvistoj estas publikaĵo de *Esperantic Studies Foundation* (ESF) kaj Centro de Esploro kaj Dokumentado pri Mondaj Lingvaj Problemoj (CED). IpI kaj ĝia anglalingva eldono (IfI) disponigas informojn kaj ĝisdatigojn en la kampoj de planlingvoj, interlingvistiko kaj lingvoplanado. Ambaŭ eldonoj enhavas detalojn pri eventoj, novaj publikaĵoj, raportojn pri lastatempaj konferencoj, kaj disponigas multajn aliajn informojn por universitatanoj kaj ĉiuj, kiuj interesiĝas pri interlingvistiko kaj rilataj kampoj.

Legu pli detale pri IpI kaj la lanĉo de IfI:

<http://www.esperantic.org/eo/2017/07/20/esf-lancas-novan-bultenon-kaj-revivas-alian/>

La limdato por kontribui al la sekva numero estas la 30a de junio 2020. Dankon!

La redakcio (Simon Davies, Angela Tellier and Humphrey Tonkin) ipi@esperantic.org

El: EKO 2020-20 sendita el Budapeŝto, la 30an de aprilo



**Titov Vitalij Nikolajevič (15.07.1948-
27.04.2020, Sankt-Peterburgo).**

Vitalij havis superan kleron, posedis anglan, germanan kaj Esperantan lingvojn. En 1979 li studas Esperanton ĉe famaj leningradaj esperantistoj Maria Solomonovna Abolskaja kaj Semjon Naŭmovič Podkaminer. Ekde 1980 Vitalij aktive partoprenas en esperantista movado kadre de la urbo. Li prelegas pri diversaj temoj: en 1984 j. en lekciejo de Palaco de Laboro en konferenco “Paco, Scienco, Esperanto”, ankaŭ en la samtitola scienc-praktika konferenco okazinta en Domo de Sciencistoj ĉe la Akademio de Sciencoj en 1986 j.

En 1988 en bulgaria urbo Burgas okazas internacia E-tendaro. Ok leningradaj esperantistoj veturas el Leningrado al Bulgario por helpi en rikoltado. Vitalij kiel gvidanto partoprenis tiun teamon.

La 17-an de julio 1992 en Peterburgo okazis fondkunveno. Tiam estis fondita Sankt-Petrburga Esperanto-Asocio: Ludmila Titova estas elektita kiel Prezidantino, ankaŭ Vitalij eniras en la estraron de la novbakita Sankt-Petrburga Esperanto-

Asocio.

En 1995 jaro al la estraro venis bela ideo inviti eksterlandanojn por aranĝi en 1996 SAT-Kongreson okaze de la 70-jariĝo de la SAT-Kongreso okazinta en Leningrado en 1926 jaro.

Estis preparitaj invitiloj por la eksterlandanoj, al SAT-estraro venis propono por okazigi la 69-an SAT-Kongreson en Peterburgo. Certe multaj neSAT-anoj ankaŭ deziris ne nur partopreni la kongreson, sed ankaŭ vidi kaj sperti proprajn impresojn pri la urbo. Por tiuj personoj estis verkita kaj kompilita poŝlibreto “Tri tagoj en Sank-Peterburgo”. La gvidlibreton verkis teamo sub gvido de Ludmila, la kompostadon faris Vitalij.

La jubilean SAT-Kongreson, okazinta la 13-20 de julio 1996, partoprenis ĉ. 240 personoj veninaj el 21 landoj de Eŭropo kaj Azio. Por havi imagon ni konsideru la Leningradan VI-an SAT-Kongreson okazinta la 6-10 aŭgusto 1926 jaro, kiun partoprenis 400 esperantistoj el 14 landoj.

Dum la tuta esperantista vivo Vitalij tradukis kelkajn famajn verkojn, inter ili tekstoj al famaj kantoj “Ladoga” kaj “Tago sen pafado sur la Tero” de M.Dudin.

Post la 1996 jaro Vitalij ne aktivis en la urba E-vivo, sed helpis al la esperantistoj laŭ propraj fortoj kaj sperto.

La 27-an de aprilo 2020 la koro de Vitalij Titov ĉesis funkcii. La 30-an de aprilo okazis funebra kremacia ceremonio.

La Sankt-Peterburgaj esperantistoj kondolencas.

Kvarantena Kreado

Mikaelo Bronŝtejn

Ĉu timu ruso
pro kronviruso?
Mi ŝajnus stulta
kun timo multa.
Do, ne kreteno,
dum kvaranteno
mi ne tro ruzas,
la tempon uzas
tute trankvile
ĉekomputile
por gaja kver' kaj
por pliaj verkoj.

25.03.2020

En mia situo kaj situacio
Nun mankas tro gajaj momentoj.
Sen plendoj enhejmas mi pace, ĉar ĉio
Alvokas nin esti prudentaj.
TV, Interreto, gladilo, gasforno,
Aŭtaĉo polica ĉemure –
Kriegas: – Hej, ci! Ne eliru vi for, do
Enhejmu por via sekuro!

Sed venas ja mi al la festa vespero,
Ĉu drinku mi hejme, en solo?

Amikoj en ĉiu angul' de la Tero,
Kunvenu en mia izolo!
Ĉu palman dimanĉon ni festu en kun',
Aŭ estu dimanĉo salika –
Ne gravas, ĉar levas la ĝlasojn ni nun
En dist', sed en rondo amika.

11.04.2020



Frenezigás la mondo,
Per la ungoj forskrapas la ruston
De l'kvieta ekzisto
En rutina, plezura ebri'.
Ne protektas admon', do
Devas nun kontraŭstari l'viruson
La homar' kun persisto
Disiĝante en tim' inter si.

Fermas limojn la gentoj,
Ĉesas flugi, piedi, trajnumi,
La gvidantoj ne trovas
Taŭgajn vortojn ĉe l'timo kaj trem'.
Ĉu ekzistas prudentaj
Solvoj en ĉi okazo, kaj ĉu mi

Ŝafe gvati nur povas,
Aŭ la solvon ekserĉu mi mem?
Mi meditas. Trankvila
Meditado l'animon pacigas.
Sin malkovras la Tero
Surekrane en la monitor'.
Alparolas nun mi la
Amikaron, kun kiu min ligas
Io pli ol espero –
Jen la solvo,
per kiu pli fortas la kor'.

29.03.2020

La kronvirusaj noveletoj

Mikaelo Bronŝtejn

Maksiĉjo havas kvar jarojn. Pluvas ekstere.

Paĉjo restis hejme, li legas la tagĵurnalon. Pluvas ekstere ekde la frumateno.

– Paĉjo, ludu kun mi! – petas Maksiĉjo.

– Vi havas multajn ludilojn ja, – grumbas paĉjo el profundo de la tagĵurnalo.

– Ne estas gaje ludi sola, – Maksiĉjo diras petvoĉe, – sed miaj amiketoj sidas en siaj hejmoj. La paĉjoj tie ludas kun ili...

– Mi dubas, – pigre respondas paĉjo. Li formetas la ĵurnalon kaj ŝaltas televidilon.

– Mi volas esti rajdisto, – firme diras Maksiĉjo. – Paĉjo, estu mia ĉevaleto!

– Kia ĉevaleto?! – malkontentas paĉjo. Surekrane evoluas futbalo. – Mi ne volas esti ĉevaleto!

– Vi estas azeno! – krietas panjo el la kuirĉambro.

Pluvas ekstere.

19.03.2020

Manjo estas granda knabino. Kvar jarojn ŝi havas! Certe, ŝi vekigas pli frue ol la patrino – jes, panjo ja laciĝas dum labortago!

Glitinte for el sia liteto kaj paŝetante senbrue, Manjo aliras la kaĝon de sia hamstro Tiŝka.

– Tiŝka, ĉu vi daŭre dormas tie? – Manjo demandas.

Tiŝka ne dormas, ĝi rigardas la knabinon per du nigraj perletoj.

Manjo malfermas pordeton de la kaĝo kaj la varma vila buleto saltas sur ŝian manplaton.

– Ni iru kisi la panjon, – flustras Manjo.

Ŝi aliras la liton, mediteme rigardas panjon, kviete dormantan, kaj metas la hamstron sur ŝian vizaĝon...

17.04.2020

Miĉjo estas bonedukita knabo. Kial ne, se baldaŭ li havos ... se oni demandas, li levas tri fingrojn de la dekstra mano kaj diras: – ...kaj duono!

Tri-kvar najbarinoj tuttage, ĉe bona vetero, sidas sur benketo apud la enirpordo de la domo, kie loĝas ankaŭ Miĉjo.

Miĉjo kutimas saluti ilin : – Bonan tagon, avinjoj!

La oldulinoj kontente respondas : – Bonan tagon, Miĉjo!

Hodiaŭ Miĉjo iras kun sia avinjo al ŝia hejmo por festa tagmanĝo. Ankaŭ apud la domo de la avinjo sidas tri oldulinoj en maskoj, gapante al neoftaj preterpasantoj.

Miĉjo salutas ilin : – Bonan tagon, avinjoj!

La oldulinoj silente gapas al la nekonata knabo.

Miĉjo mire levas la okulojn al sia avinjo kaj demandas laŭte: – Avinjo, ĉu ili ĉiuj estas surdaj?

20.04.2020

Jes ja, admirindas tiu Zoom – donaco de la kronvirusa epoko!

Viroj sidas hejme ĉe siaj komputiloj en komfortaj foteloj, kun bierkruĉoj enmane kaj babilas. Memkompreneble, pri virinoj.

Rikardo, krispa viglulo: – La plej bona aĝo de la virinoj estas inter dudek kvin kaj dudek sep. En tiu aĝo ili estas frenezaj, nesatigeblaj en lito!

Stefano, obeza, kalva: – Ne pravas vi, Riĉjo. Virino ekde kvardek estas modela! Perfekte prizorganta sin, pura, sperta pri karesado, eĉ inventema. Krome – se oni vizitu tian kun botoleto, ŝi nepre havos bonan vespermanĝon preta...

Alekso, kun griza barbo: – Tro junaj estas vi ambaŭ, knaboj. La plej kortuŝaj, certe, estas fraŭlinoj antaŭ dek sep...

La kunZoomantoj, ĥore : – Stultiĝis ci, Aleĉjo! Ili estas infanoj! Kion ili komprenas pri amoro?

Alekso: – Nenion. Sed kiam mi rigardas ilin, mi tuj pensas, ke ili ja, certe, estas jam ne miaj virinoj... Kaj mi estas kortuŝita, kaj mi ploras...

24.04.2020

Tamen ankaŭ dum la kvaranteno oni devas bani sin!

Etulo Steĉjo estas venigita en la ĝardenan ŝvitbanejon. Kvar jarojn havas la hometo, endas ekkutimigi lin al la ŝatata rusa distraĵo. Estas opinio de avoĉjo. Avoĉjo estas bonkora, li ne tuj pelas la nepon en la ŝvitejon; cetere, ĝi ankoraŭ ne havas konvenan temperaturon inter 80 kaj 90 gradoj. Steĉjo do descendas al la lageto kaj trovas, ke anasoj jam revenis el sudaj landoj!

– Avoĉjo! Avoĉjo! – li krias. – Niaj anasoj revenis! Donu al mi panpecon, mi nutros ilin!

– Prenu do... – avoĉjo descendas al Steĉjo. – Sed ne longe umu ĉe la anasoj, la ŝvitejo jam pretas.

Dek minutojn poste Steĉjo, senvestiĝinta helpe de avoĉjo, staras ĉe la pordo de la ŝvitejo. Nur arĝenta kruceto restis sur la kolo de la knabo. Steĉjo timas. Avoĉjo malfermas la pordon kaj puŝetas lin en la duonmalluman densan varmegon.

Steĉjo ŝirmas la buŝon per manplato – alie ne eblas spiri ĉi tie. Admonata de avoĉjo li nevole leviĝas sur la supran breton, sed post momento kriegas:

– Aj! Doloras, avoĉjo!

– Ĉesu kaprici, – severe diras avoĉjo, tenante la brakon de Steĉjo, sed la knabo ploregas kaj bruske forkuras el la ŝvitejo.

Avoĉjo postkuras kaj tuj komprenas la kaŭzon de la plorego: sur la brusto de Steĉjo estas ruĝeta brulvunda spuro de la arĝenta kruceto.

– Avinjo! – plende kaj larmante krias Steĉjo. – Avoĉjo... li perfortis min!
– Kion vi diras, kara?! – miras avinjo. – Avoĉjo amas vin, kiel li povus vin perforti.
– Li kaptis mian brakon, – ploras la knabo, – kaj doloris al mi, jen vidu!
– Perfortis... – grumblas avoĉjo en Esperanto. – De kie li prenis tiun vorton, ha? Zorgu, ke li forgesu ĝin, alie polico venos por min aresti!

Foje eĉ bonas, ke Steĉjo dume ne komprenas Esperanton, ĉu ne?

27.04.2020

Kvarantena humuro

Viktoro Aroloviĉ

Limeriko kun kalemburo


"Kiu kulpas," – demand' al amiko,
Kiu loĝas en Nord-Ameriko, –
"Ke tempestas virusoj?"
Li respondis: "Vi, rusoj!
– Tiel pensas ĉe ni la publiko".

19.04.2020

– Tiu kronviroza veno,
Diris reĝo kun petol', –
– Estas vere ja malbeno,
Mi kompatas vin, popol'!
Do dividu ni sen ruzo
Nun poparte tion ĉi:
Por vi restu la viruso,
Sed la kronon prenu mi!

20.03.2020

Mikaelo Bronŝtejn



**“Ponto” [Bulteno de REU (BdR)] estas oficiala informilo de la tutrusia socia organizaĵo
“RUSIA ESPERANTISTA UNIO”**

La revuon aŭtomate ricevas ĉiuj membroj de REU, ĉiuj ceteraj povas aboni ĝin ĉe la Estraro kontraŭ 250 r. jare.

**“Ponto” atendas viajn lokajn, regionajn novaĵojn! Bonvolu sendi ilin al Nikolao Gudkov nikolao@yandex.ru
aŭ (kaj) Svetlana Smetanina svsmetanina@yandex.ru**

Estraro de Rusia Esperantista Unio